

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2020:3

Monda heredaĵo de UNESKO

Ĉi tiu mapo montras la lokojn de la Monda Heredaĵo de UNESKO en Svedio. En Svedio troviĝas 15 ejoj, el kiuj 13 estas kulturaj, 1 naturaj kaj 1 miksita. Legu pli pri monda heredaĵo sur paĝo 7.



1: Laponia
Fotis: Mg-k /Wikipedia CC BY-SA 3.0



2: Gammelstads kyrkstad
Fotis: Gammelstad1 – Propra verko, CC BY-SA 4.0




9: Drottningholm
Fotis: Holger.Ellgaard – Propra verko, CC BY-SA 3.0



15: Visby
Fotis: Żeglarz – Publika havaĵo /Wikipedia



11: Hällristningar i Tanum
Fotis: Publika havaĵo /Wikipedia



13: Karlskrona
Fotis: Henrik Sendelbach – Propra verko, CC BY-SA

1. Laponia, 2. Gammelstads kyrkstad, 3. Struves meridianbåge - 3a, "Pajtas-vaara" (Tynnyrilaki), 3b. "Kerrojupukka" (Jupukka), 3c. "Pullinki" (Pullinki), 3d. "Perra-vaara" (Perävaara), 4. Höga kusten, 5. Hälsingegårdar, 6. Falun och Kopparbergslagen, 7. Engelsbergs bruk, 8. Birka och Hovgården, 9. Drottningholm, 10. Skogskyrkogården, 11. Hällristningsområdet i Tanum, 12. Radiostationen i Grimeton, 13. Örlogsstaden Karlskrona, 14. Södra Ölands odlingslandskap, 15. Hansestaden Visby

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2020 • 108-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen:

laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Bengt Olof Åradsson

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund. Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070-6200846

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Plusgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården,

680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 070 767 54 55

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Kungsgatan 13B, lgh 1201; 281 48 Hässleholm;

Tel 070-200 4574

E-post: laespero@esperantoforbundet.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Hösten gör sitt intåg och vi hoppas att så många som möjligt har kunnat använda sommaren till att – som man brukar säga – ladda batterierna. Några av oss har fortsatt att träffas under torsdagarnas samarbetsmöten via Zoom, som vi skrev om i förra numret av La Espero. De inplanerade mötena finns inlagda i Kalendariet på vår hemsida *esperantoforbundet.se*. Vill du vara med på något av mötena för att dela med dig av idéer och förslag – eller för att bara lyssna och få en uppfattning om vad vi sysslar med – så anmäl dig via Kalendariet för att få länken till mötet. Du behöver inte ha laddat ner Zoom till din dator eller telefon, det går bra att använda webbläsaren (dvs där du "surfar").

Vi har redan hunnit ha två annonser av den planerade serien i Språktidningen: nr 5 och nr 6. Den första, som var en tävling, att lösa en ordfläta med djurnamn på esperanto, har i skrivande stund resulterat i över 30 insända tävlingsbidrag. Det verkar kanske inte så mycket, men är fler svar än vi fick i en liknande tävling vi hade på prov i tidningen Flamman. Vi kommer liksom under de senaste åren också att annonsera i Studieblocket som delas ut till ett stort antal studerande vid högskolor och universitet i hela landet.

Fysiska möten och arrangemang är svåra att planera in på grund av corona-restriktionerna men vi hoppas ju på att det ska bli bättre nästa år! Under tiden får vi försöka att använda oss av Skype, Zoom och liknande nätbaserade mötesformer, eller varför inte ett vanligt telefonsamtal? Som ni kanske har hört talas om, så har ett flertal stora kongresser och arrangemang genomförts via nätet, bl a ungdomskongressen IJK och UEA:s världskongress UK, under namnet Virtuala Kongreso de Esperanto. Europeiska språkdagen i slutet av september kommer också hållas via nätet i stället för på plats i Europahuset i Stockholm, men på ett eller annat sätt – troligen en förinspelad presentation – kommer vi att vara med och representera esperanto även i år!

Styrelsen

SEF söker KKS

Har du någon form av erfarenhet av eller önskan om att skaffa dig erfarenhet inom området möten och arrangemang? Då har vi uppdraget för dig!

Det här är en tillsvidarefunktion som är tänkt att skapa kontinuitet gentemot våra medlemmar. En KKS (Konstanta Kongresa Sekretario) ska vara ett stöd för dem som vill genomföra kringaktiviteter vid årsmötet. KKS ska också, som en flygledare i slow motion, rada upp kommande arrangemang och ha kontakt med grupper och klubbar som vill arrangera kongress eller liknande sammankomst längre in i framtiden. Framförhållningen för LKK ligger på minst 1,5 år för att förberedelser och arbetstakt ska vara behaglig.

SEF har uppdraget att varje år ordna årsmöte. Traditionellt har det funnits en "LKK" (Loka Kongresa Komitato), men med svikande medlemsiffror och klubbavveckling har det stödet försvunnit till stora delar. Under ett par decennier har det allt oftare blivit styrelsen själv som fått

agera LKK. Det har inverkat mycket menligt på styrelsearbetet i övrigt. Därför togs 2017 ett strategiskt årsmötesbeslut om att styrelsen bara ska sköta själva årsmötet. Om det finns intresserade som vill göra något mer kring årsmötet så går det utmärkt. Det kan vara allt från allmän samling med gemensam middag till en traditionell kongress.

De senaste tre åren har vi alltså delat upp aktiviteterna, men det är uppenbart att det finns så många detaljer som måste samordnas att styrelsen ändå har fått engagera sig i kongressbestyren. Därför behöver vi en mellanhand, en sambandslänk så att styrelsen kan avlastas så som det var tänkt, samtidigt som de som vill ordna ett kringarrangemang kan få den assistans de behöver för att slippa återuppfinna gamla hjul.

Frågor, funderingar och anmälan till uppgiften kan sändas till: svenska@esperantoforbundet.se

Meriterande

- Att du redan har varit inblandad i kongressarbete och gärna också styrelsearbete för att ha perspektiv från båda håll
- Att du är intresserad av att hjälpa men inte ta över LKKs arbete

Uppgiften innebär

- Att du är lyhörd för förväntningar och behov från flera håll och kan väga och samordna behov och viljor
- Att du vägleder LKK med råd och struktur

Uppgiften förutsätter

- Att du arbetar aktivt i verksamhetshanteringsystemet proEsperanto (ProjeQtor)
- Att du kan lägga några timmar per månad på uppgiften
- Att du är aktiv och själv tar de kontakter som behövs och kan driva verksamheten



Idéer för läsvrån

Projekt Runeberg är ett ideellt initiativ för att digitalisera äldre nordisk litteratur och göra den fritt tillgänglig över Internet. Det drivs som ett projekt inom studenternas datorförening Lysator vid Linköpings universitet. Man publicerar verk som på grund av ålder inte längre skyddas av upphovsrätt, bland annat har man gjort verk av Carl Michael Bellman, Selma Lagerlöf, Viktor Rydberg och August Strindberg tillgängliga.

Motsvarande internationella projekt är **Project Gutenberg** som även innehåller många verk på Esperanto. Se exempel i urklippet till höger.

<http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo>

<http://runeberg.org/>

[Holberg, Ludvig, 1684-1754](#)

- [Jepe sur la Monto; aŭ la Transformita Kampano](#) (Esperanto) (as Author)

[Ibsen, Henrik, 1828-1906](#)

- [La Asocio de la Junuloj: Dramo en kvin aktoj](#) (Esperanto) (as Author)
- [Eta Eyolf](#) (Esperanto) (as Author)
- [Hedda Gabler: Dramo en kvar aktoj](#) (Esperanto) (as Author)
- [John Gabriel Borkman](#) (Esperanto) (as Author)
- [La kolonoj de la socio: Dramo en kvar aktoj](#) (Esp
- [Konstruestro Solness](#) (Esperanto) (as Author)
- [Popolmalamiko: Dramo en kvin aktoj](#) (Esperanto)
- [Puphejmo: Dramo en tri aktoj](#) (Esperanto) (as A
- [Rosmersholm: Dramo en kvar aktoj](#) (Esperanto)
- [La Sinjorino el la Maro](#) (Esperanto) (as Author)



Eble iu devus ion skribi en LA ESPERO pri la someraj virtualaj dissendoj. Mi mem malbone preparis min, ĉar dum mi rigardis la programerojn, mi ne faris notojn. Tial, tie ĉi estas nur kelkaj notoj, tute personaj kaj sen iu ajn strukturo. Kelkaj svedoj partoprenis, kaj mi vidis iliajn nomojn kelkfoje. Estis interesa sperto, ke eblas tiel aranĝi interparolojn per kunligoj de unuopaj personoj en diversaj mondopartoj. En esperanto!

Mi rigardis nur kelkajn el la virtualaj dissendoj de UEA. Temis pri "Virtuala Kongreso" kaj pri "MondaFest' ". La kaŭzo estis, ke mi nur lastmomente komprenis, ke io tia okazos. Sed bonŝance almenaŭ mi rimarkis ke mi ion maltrafos, se mi ne tuj registras min.

Estis interese rigardi la inaŭguron de MondaFest', speciale la dekminutan saluton fare de Margret Zaleski-Zamenhof. Ŝi foje jam ĉeestis kongreson kiel akompananto de la patro, kaj mia memoro de tiu fojo estas, ke ŝi nur malmulte parolis esperanton. Sed ĉi-foje ŝi parolis

interese, bone, en perfekta lingvo, en tia maniero kiel iu kiu sentas sin hejme en la lingvo, kaj kiel iu kiu profesie ofte faras tiajn prezentojn en aliaj lingvoj.

Humphrey Tonkin faris paroladon pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiu parolado jam aperis en REVUO ESPERANTO, antaŭ ol mi aŭskultis ĝin per la reta prezento. Kiel kutime, Tonkin parolis kiel se li ne havus skribitan manuskripton. En kelkaj momentoj li ne ekzakte sekvis la skribitan tekston, ĝuste tie kie la parolata lingvo preferas iom aliajn vortojn ol la skribita lingvo.

La Oratora Konkurso havis kvar aŭ kvin partoprenantojn, laŭ la regularo ĉiuj junaj, kaj ili levis gravajn temojn de la homa kunvivado kaj de la klimato-krizo de la nuna mondo.

Ankaŭ junaj estas tiuj du TEJO-anoj, kiuj proponis sin por la elekto de prezidanto de TEJO, per reta diskuto el ĉambroj en malsamaj mondopartoj. Se mi ĝuste komprenis, unu el ili estis svedino loĝanta en Germanio.

Katalin Kovac faris profesian

prezenton pri la paĝaro Edukado.net en tre interesa maniero, kaj estas klare ke tiu paĝaro estas grava por la esperanto-mondo.

La grupo E@I pere de Peter Baláž klarigis, kiel oni solvis tiujn ĉi problemojn de la esperantomovado, kiam pandemio devigis nuligi kaj komplete prokrasti tutan planitan kongreson je nur tri monatoj da averto. La estraro de UEA kun subvencio de ESF kaj laboro de E@I aranĝis eblecon senti iomete la venton de esperanto-kongreso ĉi-somere, sen bezono veturi ien.

La someraj virtualaj programeroj okazis je diversaj tagoj dum granda parto de la somero, kaj je horoj kiuj taŭgas por jen unu jen alia flanko de la terglobo.

Persone mi ne sufiĉe atentis ĉeesti la programerojn, kaj ja eblas spekti multajn el la programeroj pli poste, sed noto pri estonteco devus esti, ke oni rezervu tempon en sia kalendaro por tia kunveno en sama maniero kiel por partopreno dum kongreso.

Ulla Luin

Sukcesa vekigo de ILEI

Kun 350 partoprenantoj ni povas paroli pri sukceso, sciante, ke niaj Kongresoj kutime arigas inter 70 kaj 170 personojn.

Kun 75 programeroj, ĉiuj malsamaj krom du horoj, spekteblaj en ĉiuj horzonoj sen distingo, ni povas paroli pri bunta programo diversnivela, de babilado al serioza debato kaj al universitata prelego. Dek koncertoj plezurigis la partoprenantojn.

Kun efika prizorgado de la platformo fare de la slovakaj firmaoj E@I sen unu sola paneo, ĉio iris glate kaj pli ol kontentige.

Enhavaj konferencoj estis tre fruktodona. Diversaj pedagogiaj

spertoj aperis, kontakto inter universitatoj funkcias kaj kuras, novaj ideoj naskiĝis kaj jam estas en fazo de kontretiĝo. Plie multaj homoj povis revidi geamikojn, saluti fratece kaj babili libere. Brakumoj kaj kisoj vidiĝis sur ekrane. Do ni povis trovi konatan kongresan etoson amikan.

Aldoniĝis vidbabejoj, kun aŭ sen preciza temo, kie la ideoj furoris kaj brilis en libera etoso.

Kompreneble ILEI volas rekrei tian eblon en 2021, kun la espero, ke alveno al Edinburgo eblos por kelkaj vojaĝemaj esperantistoj sen virusaj bremsoj. Do ni nun planas *hibridan kongreson* por ebligi la partoprenon de foraj per-

sonoj, por kiuj la vojaĝo kaj alveno estas nesuperebla obstaklo.

Ni bezonos por fari tion du kompetentajn personojn, kiuj kapablos filmi kaj sendi niajn diskutojn kaj prelegojn al la mondo kaj zorgi pri debatebloj tutmondaj. La Estraro de ILEI jam decidis pri senpaga restado por tiuj du teknikaj spertuloj. Ĉar ni diskonigas tiun alvokon en aŭgusto, iu neesperantisto povas kandidatiĝi nun kaj havas 10 monatojn por lerni Esperanton.

Ĝis Skotlando dekan de julio 2021 ! Sed ni retrovu nin per la Reto jam nun tuj kaj regule tra la jaro!

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Mia sperto de la unua reta IJK

Inter la 10a kaj 18a de julio okazis IJK 2020. Partoprenis 316 homoj el 52 landoj, kaj kontribuis homoj el ĉiuj ses mondpartoj. Venis du svedloĝantoj: mi, Ingrid Antonia Berglund, kaj Tatu Lehtilä. Partoprenis 3 aliaj junuloj en Skandinavio.

La kongreso havis la elementojn de junulara renkontiĝo kiuj al mi estas klasikaj: koncertojn, interkonan vesperon, internacian vesperon, novulan programon, Gufujon, kvizon, ludadon de Homlumpo, prelegojn pri lingvoj, rakontojn pri longaj biciklovojaĝoj, diskutrondojn pri feminismo kaj plej grave: mojosegan etoson. Tamen, en unu maniero IJK 2020 estis malsama al ĉiu antaŭa IJK: ĝi okazis tute per la interreto.

Estis multaj ebloj por interagi en la reta platformo. Estis vidbabilejoj por spontanee babili aŭ pli serioze diskuti specifan temon. Oni povis elekti inter paroli nur voĉe kaj ŝalti sian kameraon. Dum prelegoj kaj koncertoj oni povis tekste starigi demandojn. Ankaŭ estis aparta skriba babilejo sub ĉiu spektaklo kie eblis saluti, ŝerci kaj klaĉi tute sen ĝeni la prezentiston, kaj tion multaj ĝuis, mi rimarkis. Dum kelkaj programoj oni komune desegnis sur la ekrantabulo, kaj foje oni dividiĝis en malgrandaj virtualaj ĉambroj por solvi taskon. La etoso dum la babilado estis malstreĉa kaj amika, kvazaŭ la partoprenantoj konis unu la alian jam de longa tempo.

Mi havis la privilegion kaj laboregon kunorganizi tiun tre specialan kongreson. La procedo komencis jam en 2017 kiam kelkaj amikoj de mi faris sian kandidatiĝon por gastigi IJK en Nederlando. Mi ofertis mian helpon. Tiam neniu sciis, ke ni devos realigi la kongreson en mondo

sen vojaĝoj. Fine de aprilo ĉi-jare estis definitiva ke fizika IJK ne eblos, kaj ni ekorganizis la retan. Mi sentis min tre inspirita esti parto de io tute nova.

Estis multaj defioj en la organizado. Unue, mankis klara ideo pri kia la kongreso estos, efektive ĝis ĝia komenco, sed malgraŭ tio ni devis fari gravajn decidojn, subteni niajn kontribuantojn kaj varbi novajn homojn aliĝi. Alia afero kiu kaŭzis kapdoloron estis la horzonoj. Kiel renkontigi kaj kontentigi homojn en malsamaj mondpartoj? Kiam kelkaj liberigas, aliaj dormas. Multaj ankaŭ laboris aŭ studis dum la semajno. La plej grava sukceso de la kongreso estis ke ni sukcesis krei fortan senton de komuneco. Ĉiuj partoprenantoj sidis en malsamaj lokoj, sed ni spertis ion intensan kune – ni iris al la samaj programoj, konis la saman platformon kaj komprenis la samajn internajn ŝercojn.

Kio pleje frapis min pri ĉi tiu kongreso estis tio, ke ĝia enretiĝo ebligis partoprenon por homoj el ĉiuj flankoj de la mondo, kiuj neniam povus veni al fizika kongreso, almenaŭ ne en Eŭropo. Laŭ mia impresoj, ĝuste ili plej aktive partoprenis en ĉi tiu IJK. Mi miras, ke neniu iniciatis grandan internacian retan renkontiĝon antaŭe, kaj mi estas dankema ke la krizo portis ĉi tiun lecionon al Esperantujo. IJK 2020 montris novan nivelon de reta renkontiĝo, kaj mi forte kredas, ke sekvos pliaj renkontiĝoj en la sama stilo!

Ingrid Antonia Berglund

Vizitu la jutuban kanalon de TEJO por rigardi resuman filmeton de la kongreso:
<https://www.youtube.com/tejoesperanto>




Loĝlandoj de partoprenintoj:

Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Barato, Belgio, Benino, Bosnio kaj Hercegovino, Brazilo, Britio, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Danio, Demokratia Respubliko Kongo, Domingo, Filipinoj, Francio, Germanio, Gvineo, Hispanio, Hungario, Indonezio, Irano, Irlando, Italio, Japanio, Kanado, Kolombio, Kubo, Laoso, Latvio, Meksiko, Moldavio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Portugalio, Rusio, Slovakio, Slovenio, Sudkoreio, Svedio, Svislando, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Turkio, Ukrainio, Usono, Venezuelo, Vjetnamio.



Grupfoto



Uzita platformo



Arĥivaj bildoj /
Rosendal 2006
Fotis B O Åradsson

Someraj kafejaj kunvenoj en Stockholm

Dum la somero 2020, la vetero permesis renkontiĝi en eksterdomaj kafejoj. Stockholm tamen estas granda, kaj multaj el la membroj ne povis veturi per aŭtobuso pro la pandemio.

La estraro de la esperanto-klubo de Stockholm planis kvin renkontiĝojn en kafejoj, kaj je kvar el ili alvenis pli ol nur la kunvokanta estrarano Soile Lingman. Do, tiel okazis kvar-foje agrabla kunestado per tri aŭ kvar personoj. Krome ĉiuj el la kunvenoj ricevis telefonvokon de membro en Tyresö.

Ulla Luin

(membro en Tyresö)

Laboro pri vortaro somerumis

Laborgrupoj povas somerumi, kaj tion faris partoj el la laborgrupo pri la enskribo de la vortaro, kiun Roland Lindblom (1931-2016) verkis. Fine de la somero 2020, la grupo eklaboras denove.


Ĉiuj 28 literoj de la esperanta alfabeto estas principe enskribitaj en la komputilan programon, dum 10 el la literoj estas ankaŭ kontrolitaj je la unua fojo. Pliaj kontroloj necesos.

Jam nun ja eblas rigardi enskribojn pri la literoj L, M, N kaj R-Z per la interreta adreso: <http://ordboken.esperanto.se/test/soktest.html>. Krom tio, partoj de pluraj el la aliaj literoj estas ankaŭ jam troveblaj tie.

Ekzemple provu la vortojn: *sablo, sablujo, sablokesto, ventosablo, flusablo*.

La laborgrupo estas gvidata de Leif Nordenstorm, prezidanto de la sveda Eldona Societo Esperanto.

Ulla Luin



LALDER.NET

La Listo de Esperantaj Retpaĝoj

(El kelklinie pri ...)






Lalder estas la mallongigo de "La Listo de Esperantaj Retpaĝoj" kun la retadreso *lalder.net*. Estas la esperantisto Johannes Genberg kiu konstruis Lalder kaj oni povas sendi al li kompletigojn se oni scias esperantajn retpaĝojn kiuj ne estas listigitaj.

Rickard Vesterberg

Pluku librojn ... kaj memoru la eldoniston Carl-Erik Ohlsson

Por memori pri la eldonisto Carl-Erik Ohlsson, kiu forpasis la 18an de majo en 2020, preskaŭ 92-jara, ni ofertas kelkajn librojn el lia iama eldonejo Al-fab-et-o. La malsupraj libroj estas senpagaj, sed la sendokoston vi povus sviŝi al nia kasisto Magnus Löndén 076-038 57 94, sed atendu ĝis vi havos la librojn. Mendu de mi, Siv Burell 070-721-34 79 / siv.burell@gmail.com.

(El Ora Ĵurnalo 30: https://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_ĵurnalo_n-ro_30.pdf)



Ora Ĵurnalo

Numero 30, Junio-Julio 2020

Kulturaro kaj vārldsarv

Ungefār samtigit som La Espero komer frān tryckeriet arangeras hundratals arangerang runt om i landet med anledning av kulturarvsvdāgen. Hinner du fā tidningen innan den 11-13 septembar, kan du kontrollera och fōrsōka ta del av vad som erbjuds i nārheten av dig. Kontrollera bland annat pā Riksantikvarie-āmbetets hemsida. Rapportera gārna i nāsta La Espero!



Frān *Vikipedio* har jag klippt och klistrat lite info om allas vārara arv. /red

Monda heredaĵo de UNESKO

La monda heredaĵo de UNESKO konsistas el la monda kulturheredaĵo kaj el la monda naturheredaĵo, ambaŭ de UNESKO.

Ĝi enhavas hom-kreitajn respektive naturajn objektojn, kiuj meritas specialan protekton. Bazo por tiu protekto estas konvencio de UNESKO decidita en 1972 en Stokholmo, kiu ekvalidis en 1975.

Por esti akceptita en la mondheredaĵon, objekto devas elstari en almenaŭ unu el jenaj ses kriterioj:

- Unika arta valoro
- Granda kultura influo al iu regiono aŭ epoko
- Ekstrema malofteco aŭ granda aĝo
- Ekzempla valoro por certa arta evoluo
- Modela reprezentado de arkitektura epoko
- Signifo rilate al elstaraj ideoj aŭ historie gravaj personoj

La ideo de la monda heredaĵo ekestis reage al la alvoko de UNESKO en 1960, savi la monumentojn de Abu Simbel (Nubio) de subakviĝo pro konstruo de la Alta Baraĵo de Asuano.

Unufoje jare la Mondheredaĵa Komitato de UNESKO kunvenas por decidi pri novaj heredaĵoj kaj diskuti la staton de jamaj.

En 2019 ekzistas 1121 heredaĵoj en 167 landoj: el ili 869 estas kulturaj kaj 213 naturaj heredaĵoj, 39 estas ambaŭkategoriaj, 53 estas en la "ruĝa listo" de speciale minacataj monumentoj.

Naturaj heredaĵoj

Ili konsistas el naturaj objektoj (montoj, plantoj, pejzaĝoj ktp.), kiuj pro sia ekstrema malofteco meritas specialan protekton.



Simbolo de monda heredaĵo

Kultura heredo

Kultura heredo estas la heredaĵo de fizikaj artefaktoj kaj netuŝeblaj atributoj de grupo aŭ socio kiuj estas hereditaj de pasintaj generacioj, konservitaj en la nuntempo kaj donitaj por la avantaĝo de ontaj generacioj. Kultura heredo inkludas percepteblan kulturon (kiel ekzemple konstruaĵoj, monumentoj, pejzaĝoj, libroj, artaĵoj, kaj artefaktoj), netuŝeblan kulturon (kiel ekzemple folkloro, tradicioj, lingvoj, kaj scio), kaj naturan heredaĵon (inkluzive de kulture signifaj pejzaĝoj, kaj biodiverseco).

Kultura heredo estas unika, neanstataŭebla kaj bela, kiu lokigas la respondecon de konservado sur la nunan generacion. Pli malgrandaj objektoj kiel ekzemple artaĵoj kaj aliaj kulturaj majstraĵoj estas kolektitaj en muzeoj kaj artgalerioj. Kulturaj organizoj kaj politikaj grupoj, kiel ekzemple la internacia organizo UNESKO, estis sukcesaj ĉe akirado de la necesa subteno por konservi la heredaĵon de multaj nacioj por la ontaj generacioj.

La ekonomio de kelkaj urbegoj grandmezure baziĝas sur heredaĵoj de artoj kiel metioj, muziko, danco, belartoj, tradicia kulinario, teatro.

Nemateria/netuŝebla kultura heredo

Nemateriaj kulturaj heredaĵoj de UNESKO reprezentas majstroverkojn el la parolaj kaj nemateriaj/netuŝeblaj heredaĵo de la homaro. Temas pri elementoj de la homa kulturo, kiuj esprimiĝas senpere per homaj scioj kaj kapabloj, ne per konstruaĵoj aŭ aliaj objektoj: parolaj tradicioj kaj esprimoj, podiaj artoj, sociaj kutimoj, ritoj kaj festoj, tradiciaj scioj kaj kutimoj rilate al la naturo kaj la universo, kaj scioj kiuj rezultas el tradiciaj metioj. Multaj el tiuj kulturaj heredaĵoj estas transdonataj de generacio al generacio kaj tiel povas evolui.

Ekzemploj de nemateria kultura heredaĵo de UNESKO estas la muziko de la migrantaj bardoj Baul en Bangladeŝo, la hispana flamenko kaj la portugala kantostilo fado.

En la listo de nemateriaj kulturaj heredaĵoj de Pollando ekde novembro 2014 enestas la lingvo Esperanto. Esperanto estas ankaŭ nemateria kultura heredaĵo en Kroatio ekde februaro 2019.



Simbolo de nemateria kultura heredaĵo



Smōrgāsbord estas sveda nemateria kultura heredaĵo

Post longa malsano Carl-Erik Ohlsson mortis la 18an de majo, en aĝo de preskaŭ 92 jaroj (li naskiĝis la 9an de junio 1928). En la anonco de morto estas skribite: "La Lasta Batalo". Li estas filo de bienisto, studis ĉe Chalmers, trovis laboron en Volvo Göteborg kaj fine venis al Skövde. Mi kantis en koruso kie, por mallonga tempo, ankaŭ partoprenis Carl-Erik. Iam poste mi kontaktis lin kaj li ekhavis



Gunnel Nilsson föddes 1925 och blev medlem i SEF 2016. Hon hade då blivit änka och klagade på brist på meningsfull sysselsättning efter att i hela livet varit en aktiv föreningsmänniska. Som ung var det idrotten och IOGT som gällde. Hon tog bland annat DM (distriktsmästerskap) i simning, gång, orientering och skidåkning. Det som låg Gunnel varmast om hjärtat var barns möjlighet att idrotta på sina villkor. Idrotten skulle vara rolig att utöva.

Redan på 50-talet gick hon med i Lottorna för att halka över till Bilkåren när hon tagit busskort. Busskortet tog hon för att kunna hyra buss utan förare och frakta ungarna till idrottsarrangemang. Lottorna och Bilkåren var hon engagerad i till 2018 då de lade ner Lottakåren i Älvsbyn.

När Gunnel klagade på brist på sysselsättning föreslog hennes son att hon skulle göra som sin mor, läsa Esperanto. Han köpte en läsplatta till henne och hon fick hjälp att komma igång. Som vanligt tände Gunnel på alla cylindrar, letade sig fram till SEF via Esperantogården, som hon kände till sedan tidigare, gick med i Esperantoförbundet

La Sveda Esperantomovado perdis "giganton"

intereson pri Esperanto. Li lernis en mia kurso kaj iun vesperon li venis kun Solveig dirante: mi trovis ankoraŭ adepton.

La klubo komencis aranĝi semajnfinajn kursojn laŭ modelo de Lennart Åberg. La unuaj kursoj okazis en Västerhöjd, la urba gimnazio, kie Carl-Erik instruis. Tiu ideo fariĝis tre sukcesa dum multaj jaroj. En la lastaj aranĝoj partoprenis pli ol 70 personoj.

Antaŭa membro, Gunnar Mattsson, iniciatis loteriojn kie Carl-Erik kun multaj klubmembroj tre aktivis. Tio estis samtempe vizaĝo de la klubo al ekstera publiko. Je tiu gajnita mono la klubo ankoraŭ vivas.

Iam poste li aĉetis kvar barakojn, kunmetis kaj kovris ilin per fasado ke fine ili ricevis aspekton de domo. Li ie trovis malnovan presejon, enstalis ĝin en tiun domon kaj komencis presi amase da libroj, broŝuroj ktp en kaj por Esperanto. Dum kelka tempo li eĉ produktis La Espero tie.

Kiam Esperantogården establiĝis li kompreneble tuj emfazis tiun ideon. Li estas unu el pluraj kiuj aktive realigis la konstruon de tiu "centro". Carl-Erik havis amase da kontaktoj, ideojn, konsilojn kaj investis monon en tiun projekton. Tutsimple unu el pluraj stabilaj kolonoj.

Carl-Erik estis gaja humorplena vortekvilibrato konstante kantanta. Li estis la vera idealisto, filantropo, kiu ĉiam pretis helpi sian "frat/in/on". Ĉio estis farebla! "Det fixar jag" estis ofta esprimo. Lia memoro pri ciferoj estis unika, lia manpreno sentiĝis kiel fiksita en ŝraŭbtenilo. Foje li diris "mi multon malbonan faris, nun mi volas ion bonan fari: Helpi la Esperantomovadon!"

Carl-Erik ankaŭ havis kelkajn fiksjajn ideojn: nek trinki kafon nek alkoholaĵon. Same lia fido por kuracistoj kaj medikamentoj estis tre malalta.

Gunnar Olsson

En entusiastisk esperantist har lämnat oss

och satte i gång att plugga. Snabbt hade hon skaffat sig ett nätverk bland esperantisterna. Hon startade en studiecirkel i Älvsby Lottakår och lyckades få in minst fyra stora artiklar om esperanto i Piteå-Tidningen och Norrbottenskuriren. Bland annat skrev hon om sin mammas kontakter med ett par franska esperantister:

"Så långt tillbaka i tiden som jag kan minnas brevväxlade mamma med en fransyska från Strasbourg på gränsen till Tyskland. Mamma var lärarinna innan hon gifte sig. På de tiden fick en gift kvinna inte ta levebrödet från en ogift. Jag tror att det var saknaden efter något intellektuellt som gjorde att hon började med esperanto. Det franska paret reste mycket, bland annat till Kina. På sina resor tog de kort som de skickade till mamma, de skickade också kort av sitt hus, sina släktingar och goda vänner.

Alla dessa kort sparade mamma. Så kom kriget och all kontakt bröts. Något år efter krigsslutet fick mamma ett brev från Madame D där hon berättade om hur de fått fly från tyskarna med Madames gamla mor i rullstol. De hade mist allt och var helt utblottade. Då tog mamma alla kort som hon sparat och skickade tillbaka dem så att de tillbaka sina minnen.

Jag tycker att detta är en solskenshistoria, vänskapen mellan två esperantister gjorde att mamma fick bevara Madame D:s kort så att hon och hennes släktingar fick en del minnen tillbaka."

Hon skrev också om en esperantoträff hos Lotta Lauritz i Ersnäs och om mitt besök hos hennes studiegrupp i Älvsbyn. I Norrbottenskuriren den 14:e februari 2018 skrev hon lite allmänt om esperanto och slutade med orden: "Detta om språket som jag för ett och ett halvt år sedan trodde var dött. Efter allt jag läst och efter alla kontakter jag fått vet jag nu: Esperanto lever i allra högsta grad!"

Gunnel avled i sitt hem den 15:e juni 2020.

Ann-Louise Åkerlund

